

AVENO # 37 AGADO de AVE kaj de AVEanoj
ek de 2011-06-01 - 2011-12-31

proponita **nova retejo de AVE** - dank al Penny Vos: <http://tutmondajverduloj.weebly.com/verda-blogo.html>

Jen, provizore la **kunvenoj de AVE**;

kiel kutime mi petas jam nun informi nin, kiu planas partopreni je iuj el niaj kunvenoj. Je la EEU-kongreso en Galvas kaj la Alternativa Semajno (esperantista) AVE partoprenos. Sed ankoraŭ necesas reprezentantoj por Dakar kaj Hanojo. Krome, se vi partoprenos je alia kunveno (SAT, IJK, ekologia ..) kaj emas okazigi AVE-kunvenon por diskuti pri ekologia ekonomio au simila temo, bonvolu respondi.

2012-03-29/ 04-01 **Tutmonda Verda Kongreso**, Dakar, Senegal, kie aktivas verda partio: Fédération Démocratique des Ecologistes du Sénégal (FEDES):

Kiu pretas prezenti Esperanton kaj AVE tie ? <http://europeangreens.eu/globalgreenscongress/>

2012-07-07-16/20 Galway (Galivo) **EEU-Kongreso** kun publika kunsido de AVE.

<http://www.europo.eu/eo/chefpagho> (kongresa pagharo) <http://eeu-kongreso.webnode.com/>

2012-07-28/08-04 **Gresiljono: Alternativa semajno kun verd-politika seminario de AVE**

La "Alternativa Semajno" celas kunvenigi ĉian alternativon: vegetaranoj kaj bestoprotektantoj, verda kaj ekologia movado, migrantoj kaj biciklantoj por aplikado de la eko-turisma; la kampada tereno taugas ankaŭ por naturistoj. Nia aktiveco: eko-turismo, prelegoj pri ekologiaj temoj, tradukado, diskutoj. <http://gresillon.org/agendo>

2012-07-28/08-04 **Hanojo: UK de UEA** eble kun kunsido de AVE - kiu pretas gvidi la kunvenon ?

2012-08-11/18 **SAT-Kongreso en Jalta** - AVE kunlaboras kadre de la Ekologiista Frakcio de SAT. Kiu el AVE partoprenos ? <http://satesperanto.org>

Bonvolu subskribi la **postulon protekti la simiojn** kiu direktiĝas al la Malaysian Palm Oil Council:

<http://www.regenwald.org/aktion/815?mt=1266>

(de, en, es, fr, pt) info@regenwald.org

En tiuj kaj aliaj lingvoj vi trovas multajn arbaro-rilatajn ret-ligojn (sed eble ankoraŭ ne pri tiu agado):

(en & ligoj al aliaj lingvoj) <http://forests.org/>

*) Ne nur la simioj perdas vivejojn. Same kiel la ursoj en Eŭropo temas pri ekstermigado de aliaj specioj flanke de la homo sapiens. Ofte ankaŭ temas pri la ekstermigo de indigenaj homoj, kiuj adaptiĝis al la vivo en kaj de la pra-arbaroj. Fakte ni devus alveni al limigo de la bezonoj de la homaro, ankaŭ al limigo de nia kvanto, kio estas malfacila kaj longdaŭra tasko. Sed aliflanke, la naturaj principoj mem zorgus koshmare pri tio.

Ni mem jam povas redukti nian vivstilon, ne manghi - au almenaŭ malpli - da viando, fiŝoj kaj produktoj de bestoj. La mondo utiligas pli kaj pli da oleo el plantejoj ofte de aliaj kontinentoj por energio (t.n. biodizelo, bioalkoholo, bestonutrajhoj), sed tio gvidas al perdo de tutmondaj valorajhoj (specioj, oksigeno, klimato).

2011-12-17 **Mazingira**

AVE subtenas la projektaron Mazingira (Tanzanio) de Mramba Simba dum multaj jaroj; ni - kaj pluraj aliaj - subtenis: orfojn en la lernejojn, konstruado de dua mez-lernejo de la granda vilagharo Salama, biogaso, re-arbarigo, kuiriligno-shpareme, mikrokreditoj, radio-stacio. Post la elekto antaŭ unu jaro, Mramba Simba estas nun vilaghar-estro por 4 vilaghoj "Ketare", kiuj parte jam troviĝis en Salama.

Aktualaj atingoj:

- Dank al pluraj donacoj eblis al Mramba Simba akompani plurajn geknabojn, kies kruroj estis deformitaj, al sukcesplena operacio. Pli grava operacio (kiu suferis pro provizora urin-vojo) savis - espereble - la vivon de knabino; ŝi ankoraŭ troviĝas en kristana hospitalo en Arusha.

- Esperantistoj el Madrido subtenis la dispensarion per sunpaneloj kaj bezonata ekipaĵo.

- Akvo, nun troviĝas puto en ĉiu vilagho.

- Rearbarigo: por pli longe teni la pluvakvon kaj mildigi la klimaton Mazingira replantadas ĉiujare la montetojn, kie antaŭe kreskis arboj. Tio okazas en kooperativa kunlaboro.

- Nova Mezlernejo: ankoraŭ mankas seĝoj kaj tabloj: ĉu la finlernintoj povus produkti - almenaŭ provizore - tion. Certe mankas taŭgaj bretoj - do, certe ankaŭ mono por finkonstrui la "Esperanto Secondary School".

- Orfoj: Ni daurigas subteni unuopajn orfojn (ĉ. 300 el 800) pagante la lernejakotizon (30 au 50 Euroj jare en baza respektive meza lernejo). La nova lernejo komencas en Januaro.

Pro manko da mono prokrastiĝis la finkonstruado de la mezlernejo.

Restas en Ketare 118 lernantoj kaj 60 lernantinoj, krome 62 gelernantoj de la (plena) najbara mez-lernejo "Makongoro Secondary School" kiuj ne povos daŭrigi la lernadon en mez-lernejo pro manko da loko. La nova "Esperanto Secondary School", kion helpis konstrui kelkaj esperantistoj (per manoj (Snorre) kaj monoj) havas jam 3 klasejojn pretaj, sed bezonas tegmentojn (fera lado) ankoraŭ por la aliaj 3 klasejoj, kaj por la administra domo, kie ankaŭ enestas necesejoj.

La ministrejo pagis almenaŭ la instrumentadon de la instruista domo, kaj decidis ke la vilaghoj devas organizi la mez-lernejojn, por ke la lernantoj povu komenci en Marto 2012.

La 4 vilaghoj de Ketare pene nun kolektas 4000 Eurojn por la lerneja tegmento. Mramba petas nin, la subtenantojn, kontribui 2100 Euroj por la administra domo.

Kaj krome (sed malpli urĝe) ili bezonas ĉ. 3000 Euroj por aĉeti 120 seĝojn por 240 lernantoj.

La 240 lernantoj povos komenci almenaŭ en Marto nur post la finpretigado. Mramba petas nin,

bonvolu subteni la projekton ĝirante al:

IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1 de la Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen kun la mencio: Mazingira (mez-lernejo).

Bonvolu sciigi vian nomon kaj adreson, kaj por kio vi ĝiras (orfoj, mezlernejo, ..), al la landaj organizantoj:

Belgio, kaj ĝenerale: Heidi Goes: mazingira @ kono.be .

Nederlando: Juri Smolders: mazingira.nl @ kono.be

Francio: Bruno Robineau kaj Boris Bouchez: mazingira.fr @ kono.be

Germanio: Manfred Westermayer: mazingira.de @ kono.be

Pag-maniero (por eble redukti viajn impostojn en Germanio):

Stiftung Mondo, z.Hd. Martin Schäffer, Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, stiftung-mondo@web.de

Stiftung Mondo, Volksbank Stuttgart, Konto 151 100 004, BLZ 600 901 00

Bonvolu sciigi vian nomon kaj adreson, kaj por kio vi ĝiras (mezlernejo), al

Adreso: Mazingira Community, c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania

rete: <smbmramba@yahoo.com>, (de,en,eo,fr,nl) <http://www.kono.be/mazingira/>

2011-09-03/05, Bonn (DE), **UEA partoprenis per kvinopo** (Stefano Keller, Melanie Maradan, Julia Noe, Marcos Cramer kaj Manfred Westermayer (AVE)) en la

Konferenco pri Daŭropoveco de UN DPI NGO (presagentejo de UN kaj la NeRegistaraj Organizoj*).

AVE, kiu ja alstrebas meti la sindevigon al daŭropoveco en la statuto de UEA, ĉiukaze volas meti la tradukon de la deklaro en Esperanton en nian retejon - kaj petos UN-DPI enretigi ĝin ankaŭ.

Ni montris je kelkaj okazoj i.a. la libron "Plano B" de Lester R. Brown (Worldwatch Institute) ankaŭ al oficistoj de la UN el Novjorko. Ĝi aparte montras ke esperantistoj ne nur flegas sian karan lingvon, sed uzas ĝin i.a. por daŭropovigi la mondon. Jen la ligo al al angla originalo:

Ni aktive partoprenis kaj ankaŭ zorgis ke justa lingvistika politiko estu en la oficiala deklaro. Ni sukcesis ke la Deklaracio enhavas atentigon pri la lingvoj de indigenaj popoloj, ĉar tiuj enhavas grandan scion pri kiel daŭropove kulturi la landon, marojn kaj (pra)arbarojn; ekz-e: eo: (che alineo 419)

"Ni alvokas por respekto al kaj inkluzivo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj rilataj naturmedioj, kaj por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo, kiu kombinas facilan ellernadon kaj klarecon kun neŭtraleco, kaj tial rigardeblas kiel esence daŭrigebla;"

(en): "We call for the respect and inclusion of ethnic languages in the educational system, as these languages comprise the complexity of their respective environments, and to take into consideration the potential of a neutral international language that combines ease of learning and clarity with neutrality, and therefore can be seen as inherently sustainable;"

Se vi volas ankaŭ sperti la etoson, jen video-kunmetajho; hazarde mi (mw) trovigas tie dum 1 sekundo (je 2 m 9 sek - dankon al Stefano por la informo) - kaj baldau vi povos legi la kongresan deklaron en Esperanto.

<http://www.un.org/wcm/content/site/ngoconference/pid/16700>

Jen la retadreso de raporto pri nia agado okaze de la konferenco de la presagentejo de UN kune kun multaj NROoj (Civitanaj Organizoj) - UN DPI NGO Konferenco:

<http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=426>

(deklaro en la angla) <http://www.un.org/wcm/webdav/site/ngoconference/shared/Documents/Final%20Declaration/Chair%27s%20Text.pdf>

(en) <http://www.undpingoconference.org/>

(de) <http://www.unric.org/de/>

*) sagha kritiko venis kontraŭ tiu "NGO/NRO", ĉar ĝi estas negativa "shildo"; preferita estis ekz-e

Civitan-Agadaj Organizoj (CAO) au civil-socia organizo.

2012: **Rio+20:** Kaj nun ni devus nin pretigi por Rio+20 - kie la brazilaj esperantistoj atendas diverslingvajn samideanojn: <http://www.uncsd2012.org/rio20/>

2011-11 **Tutmonda minaco kontraŭ la Interreto**

Temas pri minaco, kiu koncernas ĉiun interret-uzanton, kaj aparte la Esperanto-parolantaron.

AVAAZ vokas al amasa kampanjo de subskriboj kontraŭ leĝaj aranĝoj, kiuj ebligis tutmonde limigi, cenzuri, la uzadon de la Interreto.

La usona Kongreso (federacia duĉambra parlamento) debatas nun pri leĝo, kiu ebligus al ĝi tian cenzuron kaj krei nigran liston (liston de malpermes-at-oj), kiu inkludus, i.a. Youtube, Wikileaks, eĉ Avaaz, ktp. Jam de jaroj la usona registaro kondamnas landojn, i.a. Ĉinion, Iranon, kiuj subpremas uzantojn de la Interreto. Sed hodiaŭ, la efekto de tia nova cenzura leĝo en Usono estus multe pli malbona per senrestrikta blokado de retejoj al kiuj neniu uzanto en la mondo povus aliri.

Urĝas subskribi amase (mi esperas ke ghi ne estas tro malfrue):
(div-aj lingvoj) http://www.avaaz.org/fr/save_the_internet_fr/?tta

2011-11-10 La Internacia Handikapularo petas vin agadi por **malpermesi "pafajhojhetajn bombojn"**. Je la 14a de Novembro 2011 okazos sur nivelo de UN Armilkontrolaj Intertraktadoj. La Traktato de Oslo malpermesis chiujn "pafajhojhetajn bombojn"; same kiel tiu de Ottawa malpermesas kontrau-personajn eksplodilojn (minojn).

Oni atentigas, ke tie estas planita malpermesi nur la plej malnovajn tipojn da tiaj hom-kriplantaj kaj mortigantaj eksplodiloj; kiuj ech post la milito kushos amase - kaj eksplodeble - sur la teritorio. **Bonvolu subskribi:** Ekz-e SAT agadis jam aktive kaj organizis for-minigon de mino-poluita tereno en Bosnio kaj/au Kroatio.
http://www.handicap-international.de/index.php?id=1117&rid=t_2809&mid=152&aC=77d1ab20&jumpurl=0

Dankon de la **Nacia Koalicio kontrau la Mortpuno**, char la multaj protestoj helpis haltigi la ekzekuton de Hank Skinner - por almenau DNA-kontroli la materialon. Kaj dankon ankau al engaghita defendanta advokato Rob Owen. Legu pli (en la angla) <http://www.ncadp.org/>

2011-10-30 Bonvolu subskribi **kontrau la forhakado de protektita praarbaro en Sri Lanka**. La filio Letsgrow de la banano-konzerno DOLE-Food jam forhakigis 1 500 hektarojn en la Nacia Parko Somawathie. Tie vivas 400 aziaj elefantoj kaj multaj aliaj specioj. Bonvolu subteni la medioprotektantojn en Sri Lanka.
(de, en, es, fr, pt) <http://www.regenwald.org>

2011-09-29 **Bolivio** devas shanghi la planon por **brazila autoshoseo tra la pluvarbaro**.

Indighenoj protestas kontrau la planoj konstrui autoshoseon tra ilia praarbara reservejo Isiboro Secure (TIPNIS), la bolivia parto de la Amazonio. Temas pri 300 km da rapid-shoseo kion planas Brazilo por pli facile atingi la Pacifikan Oceanon. Unue ghi distranchus la oficialan reservejon de indighenoj kaj due detruos tre valoran praarbaron, kun la sekvo ke flanke de la strato oni faligos ghin pli kaj pli.

Ni, la monda publiko subtenu la bolivian prezidenton Morales postuli alternativan planon, kiu havas malpli damaghan influon. Multaj homoj en Bolivio protestas kontrau tiu plano, ni subtenu ilin. Legu pli en diversaj lingvoj: http://www.avaaz.org/de/bolivia_stop_the_crackdown/?vl

2011-07-01 alia Brazilo: **Legio de Bona Volo** atentigas okaze de la Tago de la Naturmedio (5a de Julio):

Je ĉiu neprudenta ago, iom de la planedo perdiĝas: "Legio de Bona Volo neniam kontraŭstaris la progreson, sed ĝi kondamnas poluadon de akvorezervoj, senarbarigon, kamparan malpurigon, maran poluadon kaj ĉiajn damaĝojn kontraŭ la naturmedio. Ĝi komprenas, ke la detruo de la Naturo signifas la estingon de la Homa Raso, ĉar ĉiumomente kaj en ĉiuj mondopartoj la Homo, avida riĉiĝi ĉiakoste, fosas sian propran tombon", asertas la ĵurnalisto Paiva Netto: http://www.boavontade.com/pdf/BonaVolo/68_pg16_17.pdf

Certe AVE restas neutrale rilate chiuj religioj; la kvalito de iu ajn religio oni vidas je tio kiel vivas iliaj adeptoj.

21-a de Septembro: **Agotago kontrau monokulturaj forstoj**

la konzernon Veracel en Brazilo etendighas. Arbaroj kaj homoj ghenas. Eukalipto-arbar-forsto estos kultivata en pli kaj pli granda areo. Pesticidoj kiel glifosat (Roundup) kaj sulfuramidoj neniigas la ghenajn plantojn, ili estas toksaj ankau por la vivo en la grundo.

Tutmonda Movado por la Pluvarbaroj kaj la Hom-rajta civil-agada organizo CEPEDES petas subteni per subskribo kaj proteste bojkoti Veracel-produktojn (kutime por-higienaj). Aliflanke - ankau estu respondecoj konsumantoj kaj ne uzu forjhetendajn higieno-paperojn se iel eblas.

Facile eblas por naztukoj kaj ankau je la tablo uzi la samajn shtofajn tukojn laveblajn.

Malpli facile por beboj au similaj aplikoj.

Bonvolu subteni la agadon per via subskribo - tiu pagho estas plurlingva: <http://www.regenwald.org>

26a de Septembro: **Europa Tago de Lingvoj**

http://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_Tago_de_Lingvoj

En 2010 Esperanto-parolantoj en Britio uzis la Internacian Tagon de la Lingvo, per la interreto kun bonaj rezultoj. Dankon al Ian Hudgton, skota membro de la Europa Parlamento kiu subtenas Esperanton.

Bonvolu kontakti van vian respektivan Euro-Parlamentanon por konfirmi lin, ke Esperanto estas vivanta lingvo kiun vi chiutage uzas ghin en kontakto kun Verduloj au Regionalistoj, kaj indas mencii ke esperantistoj chiam subtenas la rajtojn de minoritataj lingvoj. <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/>

(lau informo de Brian Barker: <http://www.esperantolobby.net>)

2011-07-26 Raporto pri la **AVE-Kunveno okaze la UK 2011 en Kopenhago** (12:45 - 14:15)

Partoprenis 28 homoj, inter kiuj minimume 10 AVE-membroj.

La sekretario, Manfred Westermayer, prezentis la agadon de AVE, rilate la Verdajn Partiojn per tradukado de gravaj internaciaj dokumentoj, kaj rilate la Esperanto-Mondo per informo pri ekologiaj & socialaj temoj. Ni ankaŭ partoprenis la Movadan Foiron kaj uzis la Fakan Gicheton, ambau senkostaj servoj de UEA.

Krome AVE instigis UEA-on ek de 1999 amendi sian statuton per la termino: **Daurigebla evoluo (en la senco de Agendo 21 (Pintokonferenco en Rio 1992))**, aldone al la jam citita en la statuto: "Internacia Deklaro de la Homaj Rajtoj". (vidu sube)

La diskuto komencis Christoforo Fettes, la fondinto de AVE, kiu rimarkis ke AVE estis fondita jam 1983; kaj ankaŭ pri lingvopolitiko. Nia tasko estas evolui la terminologion de Esperanton kaj daurigi la traduko-laboron, por montri ghies taŭgecon al niaj verd-partiaj samideanoj; La teamo chirkau e@i ege bone subtenas tiun laboron.

Latvo plendis ghegenerale kontraŭ la Verdaj Partioj, kaj favoris futurologion por savi la mondon. Fakte la Verduloj faras multajn realajn pashojn en tiun direkton.

Neil substrekis ke UN jam pli kaj pli engaghighas por ekologia daurigeblo.

Roy kaj Manfred informis pri nia amiko Sekojo (Billy Waldon), kiu ankoraŭ estas malliberigita - lau nia kompreno pro "fajfado" je internaciaj Esperanto-Kongresoj (1985) pri la maljusta traktado de indighenoj flanke de la Usona registaro kaj administracio.

Julio informis pri sia por-paca movado kontraŭ atombomboj - jen pole: <http://juliuszpierwszy.blog.pl>

Alvarro informis - kaj donis salutojn de Ursula Grattapaglia - ke **2012 okazos la pintokonferenco Rio+20**, kie ni devus partopreni por subteni la internacian grupon da esperantistoj. Do, kiu emas partopreni ?

Dum la kunsido pri la **Faka Agado de UEA** kaj CO-respondas ni alparolisla temon **Daurigeblo**; kaj ni povis ligi ghin al la enkonduka parolado al la kongresa temo, kiun faris la direktoro de la Kopenhaga oficejo de la Loĝantara Fonduso de UN (UNPF), s-ino Pernille Fenger. Shi traktis en sia parolado la agadon por la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN aparte koncerne junularon. Jen pri la UK: <http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=421#1>

Shi menciis plurfoje la Daurigeblan Evoluon, kiel antaŭkondicho por vivinda mondo ankaŭ por niaj junuloj kaj posteuloj.

AVE restos en kontakto kun UEA (aparte kun Jose, Mireille, Probal kaj Stefano) - oni antaŭvidas statutshanghon post 2-3 jaroj. Sur la AVE-retejo trovighas subpagharo (ek de 1999), dedichita al tiu temo:

Amendi la UEA-Statuton per kroma punkto A.3.d (la proponita cifero 3d rilatas al la statuto de 1980):

"eduki inter siaj membroj la konsciencon, ke iliaj agadoj devas akordi kun la Principo de Dauripova Evoluo sur nia planedo" - <http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/UEA.htm>

Dank' al la organizado de TEVA ni povis **ekskursi al Christiania.org**; kie Di - kiu loghas tie - klarigis al ni tre bone la diversajn vidpunktojn de tiu vere alternativa vilagho je la rando de Kopenhago. <http://ivu.org/teva/>

2011-07-02 **P.R.Chinio** vizitis i.a. Germanion - sed **timas la demokratian epidemion**.

Chinio liberigis (parte) Ai Weiwei antaŭ la registara vizito en Europo. Sed multaj aliaj disidentoj - ekz-e la Nobel-premiita XIAO Liwu - restas en malliberejo. BAO Tong - 78-jaragha iama direktoro de la oficejo por politikaj reformoj kaj kunlaboris kun ZHAO Ziyang. Tiu celis demokratigi Chinion, sed tiu provo finis 1989-06-04 sur la placo de la Chiela Paco (Tian An Men) kiam en Pekino estis mortigitaj, vundigitaj kaj malliberigitaj miloj da manifestaciantoj.

Sur tiu placo MAO Dsedong proklamis la Popolan Respublikon de Chinio 1949-10-01

Je la dekstra flanko legeblas: Shijie rénmín dà tuánjiè wànsuì "Longe vivu la unueco de la popoloj de la mondo" (oni devus kompreni tion tiel: la reciproka respekto inter la etnoj de la tuta mondo)

ZHAO estis metita sub dom-aresto, BAO dum 6 jaroj en malliberejo kaj eksmembrita el la Komunista Partio, ekde 1996 li ankaŭ estas sub konstanta observo.

BAO diris en sia supozeble plej lasta intervjuo al eksterlanda ĵurnalisto:

La china KP penas teni la stabilecon. Stabileco kiu bazighas sur timigo kaj mutigo de la homoj ne funkcias eterne.

Kiam la sama partio regas tro longe, nutrighas korupcio kaj misuzado de la potenco. La homoj chagrenighas char la klaso da burokratoj deprenas grandan parton de la valoroj kiuj perlaboras la tuta popolo. Demokratio estas pli stabila sistemo pro la reciproka kontrolo kaj intershangho da regantaj partioj.

2011-07-02 **Tibeta Autonoma Provinco** de P.R. Chinio:

Bonvolu subteni la liberigon de tibetaj aktivistoj. Multaj gemonahhoj (pli ol 300) estas formatitaj ien - por "re-edukado" - pro manifestacioj favore al respekto de la tibeta kulturo au informado de la tutmonda publiko pri la situacio en Tibeto. En Kirti junaj monahhoj rifuzis partopreni religian ceremonion kiu estis ordonita de la china administracio; ili rifuzis, char ili sentis ke ghi nur servus por propagando*. La ceremonio unue estis prokrastita char je la 16-a de Marto monahho membruligis sin protestante kontraŭ la china regado super Tibeto.

Ekz-e Norzin Wangmo, 35 jaragha verkistino estis kondaminita pro interreta komunikado kaj mobil-telefono.
(en) <http://www.freetibetanheroes.org/home.php/>
(de) http://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktuelle_aktionen/stoppt_die_gewalt_in_ngaba/#c15191
) komento AVE/mw: Ankau en la naziaj mortigaj koncentrejoj estis koncertoj au teatroj por montri al la eksterlando ke la homoj vivas tie sub gajaj cirkonstancoj.

2011-07-02 **Birmo**: Bonvolu subteni la agadon de AUNG San Suu Kyi por liberigo de miloj da politikaj malliberuloj en Birmo (MyanMar, kodo: MM). Krom la afero, ke temas pri partoprenantoj de senperfortaj manifestacioj kelkaj el ili estas enkaghigitaj sub ege malbonaj kondiĉoj.

La ret-pagho de AVAAZ montrighas en multaj lingvoj - bonvolu subteni tiun alvokon:
http://www.avaaz.org/de/stand_with_aung_san_suu_kyi/?cl=1140514458&v=9488

2011-06-27 Bonvolu agadi por **savi la restojn de la brazila praarbaro**:

La malsupra parlamento de Brazilo akceptis shanghojn de la arbaro-protekta legho.

Poste sekvus (denove) granda forhakado. Dum la pasintaj semajnoj oni murdis famajn naturprotektantojn, la murdoj supozeble estis pagitaj de la lignofalisto.

Bonvolu kune alvoki al la nova prezidantino Dilma Rouseff malpermesi (vetoi) tiun leghon.

Bonvolu subteni per subskribo je AVAAZ la 79%-oj de la brazilanoj kiuj subtenus la vetoon.

(10 lingvj) http://www.avaaz.org/de/save_the_amazon/?v

Komento AVE/mw: Fakte chiu arbo kaj arbaro konsistigas la "pulmon de la Tero", sed granda areo kiel Amazonio ighus dezerto, se oni komplete senarbarigos (denove) grandajn areojn tie. Jam nun montrighas en Amazonio ke sekeco minacas la agrikulturon, kaj la grundo (Laterit-grundo) bezonas dauran ombron kaj foli-faladon.

Nova Maja bulteno de EEU : 1. okaze de la pola Eo-sembleo oni kantis la EU-himnon en Esperanto.

2. EEU distribuis - dank al ampleksa laboro de Malgorzata Handzlik - al chiu EU-parlamentanoj la rekomendon de la Civila Platformo pri Multilingvismo uzi Esperanton kiel enkonduka (propedeutika) lingvo - vidu:

<http://www.springboard2languages.org>

<http://remush.be/bulteno/>

Por konvinki anglalingvanojn pri la valora potencialo de Esperanto:

(en, eo) <http://esperantic.org/en/>

2011-9-11/18 Raporto pri EKOTUR, Prago:

La tradicia **ekoturisma renkontiĝo** por piedturistoj kaj biciklantoj ek de Dobřichovice (apud Prago).

Estis tre bela vetero, la eksursoj bone organizitaj, kelkaj migradis kaj biciklis - parte al krutaj padoj, parte sur la shoseo. Ni lernis iom pri la mil-jara historio de Chehio, ankau pri tiu sub la nazioj kaj komunistoj. Movighinte inter Prago kaj Beroun ni eksciis la biologion kaj geologion. Sekvontjare aliaj organizos ghin.

Ni festis la aperon de la nova Ekoturisma Vortareto (Kava -Pech). www.kava-pech.cz/ekotur

Petro Chrdle perdis parton de la adresoj de antaue EKOTUR - do, se vi generale interesighas je ekologia turismo bonvolu kontakti lin: <chrdle (che) kava-pech.cz>

2011-06-10 Neil Blonstein kaj Arun Bhattacharyya e-isto el Kalkato partoprenis "Antau-konferencon de la Bonn Konfenco de UNO/DPI/Septembro 2011". Ili disdonis novan informilon: Esperanto kaj la Verduloj. **Brice**

Lalonde (iama Verda Partio Estro de Francio) **pri Esperanto**: diris ke "junuloj devas lerni du au' tri lingvojn" en sia prelego. Tiu reagis: "Chu vere Esperanto estas pli facila, kaj kiom da homoj lernis ghin ghis dum chu 100 jaroj ? Se pli da homoj lernu la lingvon mi povis pensi alimaniere (sed ghis nun ne eblas)."

Komento AVE/mw: klare politikistoj rigardas al nombroj, se ne temas pri siaj propraj vizioj.

2011-08-07/17 Serbio, Somera tendaro pri daurigebla vivo - ne-perforto kaj sekureca politiko

La tendaro estos financata de la (tut)-Europa Konsilio, Europa Junulara Fonduso, Verda Europa Fonduso kaj Verda Forumo Svedio. Ghi estos organizata kiel modelo de mem-sustenebla komunumo kiu praktikas la principojn de medioafablan viv-stilon. Estos tendoj kaj chefe sub-chiela agado. Chiu partoprenos en la organizado, problem-solvado kaj decidado. La inter-lingvo ? (certe la angla, sed supozeble ankau aliaj) Cooperation and Development Network Eastern Europe, Address: Rue Wiertz 31, B1050 Brussels, Belgium Tel/Fax: + 381 63 7740238; E mail: office@cdnee.org, Web: www.cdnee.org

Pri AVE

Bonvolu subteni Rise-Up: De tie ni sendas la AVE-Novajhojn al la alighintoj en Rise-Up. Ghi ankau transportas viajn komentojn al chiu aliaj. Kaj se iu serchas tie Esperanto - oni trovas nin. Ili agadas libere kaj ne komerce, pro tio ili dependas de subtenoj de iliaj uzantoj.

Do, se iu el vi - ekz-e en Usono au kun kredit-karto (kiun mi ne havas) povus subteni ilin per 10 au similaj dolaroj, mi rigardus tion kiel pago de AVE-kotizo (se vi skribas tion samtempe al mi). <https://riseup.net/donate>

AVENO 36 estas preta en ampleksa formo sur nia retejo; en konciza formo ghi estis transdonita dum niaj renkontighoj sed ne sendita papere. AVE havas ch. 325 membroj. Financoj restas feblaj. UEA-konto: avex-z